William Butler Yeats,
La ĉielaj teksaĵoj

tradukita de Aaron David Irvine

Se havus mi la ĉielajn teksaĵojn,
Broditajn per ora kaj arĝenta lumo,
La bluajn nigrajn blunigrajn teksaĵojn,
De la tago la nokto la duonlumo,
Ilin mi etendus sub viajn piedojn:
Sed malriĉante, mi posedas nur da revoj,
Kiujn mi metis ame sub viajn piedojn;
Paŝu delikate, ĉar vi paŝas sur miaj revoj.

Traduko de la Angla poemo "He Wishes for the Cloths of Heaven" de WILLIAM BUTLER YEATS *(∗1865-06-13 – †1939-01-28) en Esperanton de Aaron David Irvine.*

Arg-1104-2230 (2014-12-19 18:36:35)

Tiu ĉi poem-esperantigo troviĝas ankaŭ en `http://lingvo.org/poemoj/ts.php`.